

Александр Сергеевич Пушкин,

## La vintra veturo

*tradukita de Сергей Григорьевич Рублёв*

En nebulo sur ĉielo  
Vagas luno kun sopir',  
Plensopire en malhelo  
Lumas ĝi en sia ir'.

Sur la neĝo longa vojo  
Sledo iras en rapid',  
Sonorilo tre malĝoja  
Monotonas kun incit'.

Kondukist' en longa kanto  
Kantas multe kun fervor',  
Jen pri ĝojo aroganta,  
Jen suferon de la kor'.

Mankas fajro en vilaĝo ...  
Sola neĝo ... En vetur'  
Unutonas la pejzaĝo  
De la vojmontriloj nur.

Tedas tute. Morgaŭ, Nino,  
Jam finiĝos mia voj'.  
Ĉe kameno, karulino,  
Ni forgesos pri malĝoj'.

...

Sur horloĝo la montrilo  
Venos plene ĝis la fin',  
Noktomezo kun ĝentilo  
Ne disigos certe nin.

Mi sopiras kaj enuas,  
Kondukist' silentas nun;  
Sonorilo tinte bruas,  
Plennebulas pala lun'.

*Traduko de la Rusa poeto "Зимняя дорога" de АЛЕКСАНДР СЕРГЕЕВИЧ ПУШКИН (\*1799-06-06 – †1837-02-10) en Esperanton de СЕРГЕЙ ГРИГОРЬЕВИЧ РУБЛЁВ (Sergej Rublov, \*1901 – †1979).*

*Arg-1123-2272 (2015-02-02 13:32:54)*

*Pri la tradukinto vidu la retejon <http://ru.odeso.retejo.info/famaj-e-istoj/rubleev> kaj <http://en.odeso.retejo.info/famaj-e-istoj>.*